ADORU 402



2. Brilas en nokton klara lum',
nokto ne lumon perceptas.
Di' sendis Filon al krucum',
sed Lin la mond' ne akceptas.
Li en la mondon kiel hom'
venis, sed restis Lia nom'
fremda kaj eĉ malamata.

3. Sed ĉiuj, kiuj fidis Lin,
kiuj de l' nokto foriris,
kaj pentis, preĝis, turnis sin
al la Savanto, akiris
Lian heredon, poste pli:
per Lia sankta nomo vi
iĝas infanoj de Dio.

4. Al Sia Patro iris Li,
lokon por ni Li pretigas;
kaj nun la *Sankta* Spirit' de Di'
nin al la vero irigas.
Per Dia vort' en Lia nom'
sendas nin Ĝi al ĉiel-dom',
per Jesu, vojo kaj vivo.

5. Estu mi inter tiuj, Di',
kiujn Vi amas kaj konas.
Tage kaj nokte iru mi
la vojon, kiun Vi donas.
Sen Via help' perdiĝos ĝi,
per Via forto flugu mi,
ĝis en ĉielon mi venos.

JESUS, DU ER DEN HIMMELVEG • NSB 418 • M (Kirken): Ludvig Mathias Lindeman 1840, Unisono 112, NSB 689 • norvega T: Elias Blix 1875 • E: Hans Amund Rosbach, 1966 en CH 48 • AK 154 • ↑ Joh 14,6